# Ne " iel ajn" pri ajn

- **ajn** estas nedeklinaciebla partikulo kaj nenio pli
- ajn **ne estas** substantivo, pronomo, adjektivo, adverbo, prefikso, sufikso
- **ajn** nur akcentas nedifinitecon de la antaŭa vorto

***kia ajn, kial ajn, kiam ajn, kie ajn, kiel ajn,***
***kies ajn, kio ajn, kiom ajn, kiu ajn***

Same oni povas uzi "ajn" kun nedifinaj tabelvortoj:

***ia ajn, ial ajn, iam ajn, ie ajn, iel ajn,***
***ies ajn,io ajn, iom ajn, iu ajn***

**Ekzemploj kun klarigoj**

**Kiu ajn** pafis al ili, li estas murdisto.
(Ne estas grave kiu pafis. Ĉiu kiu pafis estas murdisto.)

**Kiun ajn** filmon mi rigardas ŝajnas al mi, ke mi jam vidis ĝin.
(Ne estas diferenco inter la filmoj)

**Kiuj ajn** homoj laboras kune, ili havas pli bonajn atingojn.
(La homoj povas esti diversaj.)

**Kiujn ajn** reprezentantojn ni elektas ili ne plenumas niajn esperojn.
(Tiu, aŭ aliulo nenion garantias.)

**Kio ajn** okazos post la esploro li ne restos en la malsanulejo.
(Ĉu li estas sana, aŭ malsana li ne volos esti en la malsanulejo.)

**Kion ajn** vi donas al ŝi, ŝi estas kontenta.
(Ŝi estas kontenta pro ĉio - valora, aŭ nevalora.)

**Kia ajn** estas la vetero, vintre ni skias en ĉiu tago.
(Ĉu estas bona aŭ malbona vetero ni skias)

**Kian ajn** robon vi havas sur vi, en ĉiu vi aspektas bela.
(Via beleco ne dependas de iu robo.)

**Kiaj ajn** estas la floroj, ĉiuj estas belaj.
(Ĉu grandaj, malgrandaj, ruĝaj, flavaj - ĉiuj estas belaj.)

**Kiajn** ajn librojn mi ne ŝatas.
(Gravas kiaj estas la libroj.)

**Kial ajn** ili tion faris ili estas fiaj
(Ne grava estas la kaŭzo de ilia faro.)

**Kiam ajn** mi petas vian helpon, vi neniam havas tempon.
(En neniu tempo vi volas helpi al mi.)

**Kie ajn** vi estas, oni trovas vin.
(En neniu loko vi povas kaŝi vin.)

**Kiel ajn** oni klarigas al li, li ne kredas.
(Neniu persvado estas efika.)

**Kies ajn** estas infano, ĝi devas obei la instruiston.
(Ĉu gravaj, aŭ ne gravaj estas ĝiaj gepatroj la infano devas obei.)

**Kiom ajn** da mono ŝi havas, ŝi ĝin disdonas.
(Ĉu multe aŭ malmulte da mono ŝi havas, ŝi ĉion disdonas)

***

**Iu ajn** persono povas esti geniulo.
(Ne estas grave kiu.)

**Iun ajn** oni bezonas por laboro en ĝardeno.
(Estas indiferente kiu laboros.)

**Iuj ajn** konatuloj ne estas fidindaj.
(Oni devas elekti el la konatuloj.)

**Iujn ajn** klaĉojn mi ne volas scii.
( Neniujn klaĉojn mi volas scii.)

**Io ajn** estas en la pakaĵo, ĝi ne interesas min.
(Neniu enhavo de la pakaĵo interesas min.)

**Ion ajn** vi intencas fari, pripensu tion.
(Ĉu ion ĝustan, aŭ malĝustan vi intencas fari.)

**Ia ajn** estas la prezo, ili aĉetos domon.
(La prezo ne estas grava.)

**Ian ajn** domon ni devas aĉeti.

(Ne estas grave, kia domo estas.)

**Iaj ajn** okupoj ne donas kontentecon.
(Diversaj neinteresaj okupoj ne donas kontentecon.)

**Iajn ajn** infanojn havas patrino, ŝi ĉiujn amas.
(Ĉu sanajn, aŭ kriplajn, ŝi amas ilin.)

**Ial ajn** la ĉefo ne ŝatas lin.
(Pro iu nekonata kialo la ĉefo ne ŝatas lin.)

**Iam ajn** oni povas studi.
(En nedifinita tempo oni povas studi.)

**Ie ajn** mi povas loĝi.
(La loko ne estas grava. Mi povas loĝi ĉie.)

**Ien ajn** vi iras, via hundo akompanas vin.
(Ne grava estas la loko kien vi iras, via hundo ĉien iras kun vi.)

**Iel ajn** infano trompas patrinon, ŝi scias, kiam ĝi mensogas.
(Malgraŭ, ke la infano per diversaj manieroj intencas trompi patrinon,
ŝi bone scias, kiam ĝi mensogas.)

**Ies ajn** estas la arbo, ne prenu fruktojn.
(Ĉu la arbo estas de konato, aŭ fremdulo, ne prenu fruktojn.)

**Iom ajn** vi bezonas, mi donas.
(Ĉiun kvanton mi donas, multe, aŭ malmulte.)